

AVENO #44 - Homaj Rajtoj - 2018

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.
Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, ... sh + u. Ligoj:
AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj"
Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/
Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>
= = =

2018-12-31 Rajto de memdetermino
eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino
Kommento de Mirejo: tiu rajto neniam validas. bedaurinde

= = =

2018-12-18 Tanzanio persekutas samseksemulojn – bonvolu subteni la petition
Altranga oficisto de la registaro en Tanzanio volas chasi tiujn homojn kiuj havas alian seksan orientighon ol la majoritato – kutime nomita grupo LGBTI-anoj. Li postulis minimume 30 jaroj en malliberejo por tiaj, kaj ankau se oni informas prie.
Bonvolu subskribi la peticion por kontraui (en 9 lingvoj):
www.thepetitionsite.com/966/626/521/urge-tanzania-to-stop-the-anti-lgbti-witch-hunt/

2018-12-13 P.R.Chinio neglektas homajn rajtojn, kaj rajtojn de minoritatoj
Delonge la china registaro subpremas – almenau kulture – la regionajn popolojn de Orienta turkeŝtano/Ujgurio (XinJiang) kaj Tibeto (XiZang). Diskuti pri vera autonomio oni ne rajtas – malgrau tio, ke la provincoj nomighas „autonoma“.
En XinJiang oni instalas lagrojn por „eduki“ la popolon; lau informoj temas pri miliono da ujuguroj.
Evidente en tiuj lagroj la homoj devige devas produkti sport-vestojn.
www.tagesschau.de/ausland/arbeitslager-china-101.html

Simile en XiZang - tie la budhisma religio estas limigita – chefe al tradicio fono por turistoj. Posedi la foton de Dalai Lama estas krimo. La registaro detruis malnovajn logh-kompleksojn, kaj konstrukis modernaj logh-skatoloj, char tiuj estas pli facile kontroleblaj. Komunaj kunvenoj estas malpermesitaj, kaj la modernaj „okuloj de la granda frato“ monitoras la movighon de homoj.
Tsewang Norbu, kiu mortis la 19an de Augusto 2018, estis la plej aktiva reprezentanto de Tibetanoj en Germanio. Erkin Alptekin de la ujugura populacio verkis nekrologon por sia tibeta amiko.
Pli pri Tsewang Norbu: www.tibet-initiative.de/im-gedenken-an-tsewang-norbu

Kommento de AVE/mw: Kial ne eblas doni kulturajn autonomion al aliaj etnoj, kiuj setlis delonge en tiaj regionoj kie nun regas alia etno – en multaj landoj ? (Chinio, Turkio (Kurdoj), nuna Brazilo (indighenoj), ...) Alia afero estas pri migrantoj kaj fughintoj – por ili UN nun verkis nedevigajn interkonsentojn:
www.eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Organizo_por_Migradoj
www.unhcr.org/a-new-deal-for-refugees.html

2018-12-13 Rusio punis ukrainan reghisoron Sencov
Li devenas el Simferopol, Krimeo, estis punita al 20 jaroj pro planado de terorismaj atencoj.
Fakte li aktivis 2014 en Kievo je la okcidentema Maidan-manifestacioj – kaj kontrauis la anekson de Krimeo flanke de Rusio. Eble vi legis la libron de Kalle Kniivilä „Krimeo estas nia“.
www.tagesschau.de/ausland/senzow-107.html

= =

2018-10-24 Asova Maro - Rusio blokas havenojn Mariupol kaj Berdjansk, kontrau internacia legho
Rebecca Harms, MEP de Verduloj, parolis antau la EP pri la nova agado flanke de Rusio, en la Asova Maro. Post la konstruo de la ponto kiu rekte ligas Rusion kun Krimeo (la aligo de Krimeo al Rusio ankoraŭ estas rigardata ne-legha) Rusio kontrolas la mallarghan kolon che Kertsh, pere de siaj armeo.
Rusio malhelpas la traveturadon de ŝipoj al la ukrainaj havenoj Mariupol kaj Berdjansk, kaj tiamaniere ghenas la ekonomion kaj provizon da varoj al tiu regiono.
Lau interkonsento de 2004 Rusio kaj Ukrainio rajtas kontroli la ŝipojn en tiu mareto. Sed nun Rusio ghis 4-

foje kontrolas transport-shipojn, tio fukcias kiel blokado.

Krome, la ponto ne estas sufiche alta – 35 m - kaj pro tio kelkaj shipoj ne plu povas trapasi en la Azovan Maron.

www.youtube.com/watch?v=n6QEMW1Qiv4

Rebecca Harms postulis inter alie:

La komuna organizajho OSKE devas monitori ankau tiun regionon.

EU devas zorgi ke la laulegha situacio de ukrainia teritorio ankau en tiu che-mara regiono restu ne-tushita.

EU devas zorgi ke Rusio ne ricevas materialon kiu necesas por tia kontrau-legha barado.

(lau shia parolado – kaj lau radiostacio MDR.de, 2018-08-16)

<https://www.mdr.de/heute-im-osten/ostblogger/ukraine-russland-asowsches-meer-100.html>

= =

2018-10-18 EBOLA denove aktivas en DR Kongo

Ebola estas unu el la plej dangheraj infektoj – nun denove aktivas en Nord-Kivu.

Bedaurinde en tiu regiono mankas ghera sekureco – se milico atakas homojn ili tiamaniere helpas disvastigi la malsanon – kaj sekve de tio eble mem malsanighas.

Gravas noti ke plej grave estas ne plu tushi la mortintojn (char tio preskau certe gvidas al infekto).

Kutime oni lavas mortinton (pro pra-religiaj kutimoj en pluraj socioj) – sed chi-kaze la Rugha Kruco k.a. petas ne fari tion.

Intertempe ekzistas vakcino – sed ne sufiche da. Tio signifas, ke aparte en la regiono kie loghas iu kiu malsanighis, estus konsilinde ricevi la vakcinadon.

Kaj kiu malsanighis kaj opinias, ke povus esti Ebola – tuj iri en kvarantenon kaj informi la medicinistojn.

--

2018-10-15 Italio agas kontrau logiko – kaj kontrau homeca komprenemo:

la nuna registaro de alternativuloj (Beppe Grillo) kaj dekstruloj (Salvini, de Lega) prezentis shtatan financplanon – bone.

Sed multaj europaj instancoj dubas chu tio estas daurigebla afero: redukti la enspezojn kaj altigi la elspezojn. Eble ili esperas ke tiamaniere la ekonomio tiom bone evoluighas, ke la malaltigitaj imposto-kvotoj donos pli da enspezon.

Aktuale Domenico Lucano, la urbestro de Riace – urbeto en Kalabrio kun 1.800 enloghantoj estas malliberigita (dumtempe).

Chu li estis korupta ? Pri tio ne temas. Do, kial ?

Char multaj (junaj) homoj forlasis tiun vilaghon pro manko da laborlokoj, la vilagho komencis perdi sian funkcion. Tial la urbestro setligis dekojn da rifughintoj en malplenajn domojn. La lernejo denove ekfunkciis.

Kelkaj malfermis vendejojn kaj ricevis klientojn. Venis turistoj. Estis sukceso por la tuta vilagho.

La ministro pri la internaj aferoj, Salvini, decidis ke tio ne povas esti:

la rifughintoj reiru al la kampadejoj – la vilagho re-ighu dormejo – la urbestro estas akuzata pro kontraulegha subteno de enmigrado.

Inform-fonto: zeit.de/politik/ausland/2018-10/italien-riace-dorf-fluechtlinge-buergermeister-umzug

= =

2018-10-02 Alternativa Nobel-Premio- Right Livelihood Award (de Jakob von Uexkuell)

Honora premio (sen mon-donaco): Thelma Aldana & Ivan Velasquez Gomez

ili estas juristoj kiuj agadas kontrau korupcio kaj misuzo de povuloj.

Homaj Rajtoj: Adullah al-Hamid, Mohammed Fahad al-Kahtani, Walid Abu al-Chair ek de 2014 ili estas en malliberejo char ili engaghis por dividita povo, Homaj Rajtoj kaj la fino de vira prefero en Saudi-Arabio.

Ekologio: Toni Rinaudo (Australio) & Yacouba Sawadogo (Burkina Faso)

ek-uzo de FMNR (kampane mastrumata natura regenerado de arboj) en la sekaj regionoj de Afriko; tiamaniere ebligas rearbarigo el la restantaj radikoj (post faligo de arboj) en la Sahel-zono.

--

2018-10-04 **Nobel-Premio pri Paco** - pri agado kontraŭ la seks-perfortado dum militoj

Denis Mukwege, Bukavo, DR Kongo, kuracisto, kiu kuracas virinojn kiuj estis grave vunditaj pro seks-perforto aŭ simila kruelajho (ofta okazo en militoj). Li parolas publike (ekz-e antaŭ UN 2012) kontraŭ tiaj kruelajhoj kaj por persekuti la organizantojn kaj agantojn. Oni klopodis murdi lin.

Nadia Murad, Sindshar, Irako, kiu apartenas al la jesida etno & religio (parenca al kurda etno, religio parenca al Zaratustra). Tiu etno estis ofte persekutata kaj 2014 la t.n. Islama Shtato intencis murdi chiujn vivantajn en tiu regiono. Dank al internacia helpo kaj aparte la PKK (kurdaj soldatoj) ili estis savitaj. 18 el shia familio estis murditaj. Shi ighis sklavo de diversaj IS-batalanto kaj finfine – dank al kurda familio estis savita. Kaj nun vivas en Baden-Virtembergo, ĉar tiu germana lando aparte invitis 1000 virinojn de jezidoj. Shi parolis antaŭ la UN kaj nun kune kun Amal Clooney shi laboras por ke chi-tiu genocido flanke de IS estu persekutata de la Internacia Pun-kortumo.

2017 ICAN (Internacia kampanjo por abolicio de atombomboj) estis honorigita.
(detaloj dank' al wikipedia.org)

--

2018-09-21 Bona politiko bezonas objektivajn ĵurnalistojn

Sed en pluraj landoj la registaro – aŭ aliaj grupoj - ne volas tion – pluraj estas mortigitaj, aliaj en malliberejo. En kelkaj landoj (Rusio, Turkio, ...) la registara kliko aĉetis la amas-mediojn (gazetoj, TV-kanaloj) kaj tiel malfaciligas la objektivan informon:

Rusio, Afghanio, Irano, Myanmar, Turkio, Ĉinio (autonomaj regionoj). Jen la koncernaj ret-paghoj:
reporter-ohne-grenzen.de (germana)

rsf.org (angla, araba, farsi/irana, franca, hispana, portugala)

2018-09-19 Brit-eliro ĉu vere ?

Post la eliro de 2 „malmolaj briteliruloj“ el la registaro kreskas espero ke May sukcesos molan eliron.

Norvegio povus esti bona modelo.

La postulo ke trans-limigo de varoj estu pli liberaj ol de homoj estas ne-akceptebla de EU.

Se Grand-Britio ne sukcesos trovi taŭgan vojon, estas du eblecoj:

au malmola eliro 2019 kun multe da nesolvitaj problemoj,

au denova referendumo.

La urbestro de Londono Sadiq Khan ĵhus postulis novan referendumon – sed ĝhis nun la ĉefministro May ne volas tion.

--

2018-07 iomete da paco kaj multe da milito

Feliche finis la militado inter Etiopio kaj Eritreo. Etiopio finfine akceptis la ekzistorajton de Eritreo kaj ili interkonsentis pri la limoj. Gratulon kaj bondezirojn !

Bedaurinde en Eritreo la Homaj Rajtoj estas malbone agnoskitaj.

En Suda Sudano estis espero pri fino de la interna milito – sed mankas la pruvo.

En pluraj afrikaj landoj malsekureco kaj egoistaj prezidentoj restas granda minaco kontraŭ bona daŭripova evoluo.

Mjanmao (Birmo) ĝhis nun ne plenumis repreni la forpeltajn Rohinja-popolon; male la detruoj de iliaj vilaghoj daŭras. Amnestio Internacia unuflanke kontraŭas tiun kruelan reagon de Myanmar, sed aliflanke raportis ke en 2017 Rohingya „militistoj“ murdis ali-religiajn homojn.

(lau [Www.amnestio.org](http://www.amnestio.org))

Komento AVE/mw: La budhisma registaro eble volas preventi ke la islama religio minacas la budhisman.

Kolombio elektis novan prezidenton – Ivan Duque. Espereble li daŭrigos la civilan politikon.

Sirio kune kun Rusio militas same kruele kontraŭ la lasta regiono kiu ne volis sekvi Assad. Ĵheti bombojn, fajro-barelojn kaj kemiajn armilojn (Sarin kaj klor-gaso) estas pli facile ol batali sur la tero. Bedaurinde multe pli da civitanoj mortas aŭ devas fuĝi – kien ? Libano kaj Jordanio jam plenas da rifughintoj, Israelo helpas ilin per medicino k.a. sed nur ekster sia limo.

Komento de AVE/mw: mi ne komprenas, kial la ribeluloj ne finas kaj petas pacon, vidante la situacion - ke internacia helpo kontraŭ Assad neniam venos. Bedaurinde UN ĝhis nun ne sukcesas sufoki tiajn internajn militojn kaj devigi la respondeculojn kunsidi je ronda tablo por trovi pacan solvon.

Irano komencis rezigni pri sia atomarmila programo - espereble ghis plena abolo.

Chu la Korea Duoninsulo malhavos atombombojn ?

Opinio de AVE/mw: Dum Usono posedas tiajn, kaj la nuna autarkia ideologio restas, ili libervole ne fordonos tian valoran (kaj minacantan) atom-armilaron. Daurigo en la mutuala paca kunlaboro jam estus granda sukceso.

(informoj plejparte el wikipedia.org)

= =

2015-05-24 Kreskanta homara populacio en la ekologi-rilata encikliko de Papo Francisko

En Majo 2018 mi vizitis la grandiozan katedralon de Kolonjo. Hazarde trovis la germanan version de la għenerale laudata encikliko Laudato Si' .

Mi tralegis la 170 paghojn – tiun parton pri la rakonto de minacoj kontraŭ la vivosfero pli detale ol la partojn pri la teologia argumentado, ĉar pri tio mi ne kompetentas.

Jes, vere estas nova sento en la eklezio rigardi la vivosferon ne nur el la „pinto de la evoluo“ – al kiu ni vidis nin mem ... La Papo Francisko ja intence alprenis ĉi-tian sian nomon, ĉar li sentas sin posteulo de Sankta Francisko, ties preĝo por la Tero trovigas je la fino, kaj la Sun-kanto je alineo 87 .

Mi neniam legis tiom detale pri la minacoj kiuj venas el industri-maniera agrikulturo, kemiaĵoj kaj plastajhoj en la naturo, nia „granda piedsigno“ - tre bone li ankaŭ kritikis la profitocelan financ-sistemon. Tiu encikliko estas leginda kaj pripensinda de ĉiuj politikistoj.

Tamen – Francisko (en alineo 50) ne tre logike kritikis la celon redukti la kreskadon de la homara populacio, sed kvazaŭ postulas „kreskantan populacion“ (tiu postulo jam trovigas en la Sankta Biblio) kaj citante tekston de 2006:

„se malegala distribuo de homoj kaj resursoj għenas la evoluon kaj konvenan traktadon de la natur-medio, oni devas agnoski ke kreskanta homara populacio konvenas kun ampleksa kaj solidara evoluo“ - kiam la distribuo estus pli egalece organizita.

Tio signifas, kiel ankaŭ en aliaj tekstoj de la katolika eklezio, ke ili kontraŭas familian planadon - cele al malpli alta nombro da infanoj.

2017 pli ol 60 milionoj da homoj estis fughintoj (laŭ UNHCR). Jes, malegala distribuo de resursoj estas grava problemo. Militoj kaj malamo inter etnoj kausas ke milionoj devas fughi; ĉio estas malfacile solvebla dum ni ne havas efikan tutmondan registaron.

La homara populacio kreskadas rimarkinde, fine de 2011 NI estis 7 , fine de 2016 ni estis 7,5 , 2050 ni eble estos 9,7 miljarde. Chu ekzistas kvanto-limo de la homaro por la katolika eklezio – ĉu por aliaj religioj ? Ĉiu bebo en ajna familio meritas protekton, subtenon kaj evoluighon; sed racie necesas limigo al sħaħa daŭripova kvanto da beboj kaj sekve de la homara kvanto.

- - -

2018-05 protestanta eklezio en BW postulas pri paco ..

1. Justaj eksterlandaj rilatoj
2. Daŭripova evoluo por la najbaraj landoj de EU
3. Partopreni je la internacia arkitekturo pri sekureco
4. Resilienca demokratio
5. Shangho de la germana militaro kaj de armil-industrio

www.ekiba.de/html/content/szenario_sicherheit_neu_denken.html

- - -

2018-05-25 MH17 - Rusio ne kredas la specialistojn

Denove - pardonu – mi forĝesis doni la fonto-indikojn:

Bedaurinde Rusio malsagħe mensogas kiam ili opinias ke taugas. Same kiel je dopingo en sporto, kiel je la provo mortigi iamajn spionojn au kritikulojn. Kaj delonge se temas pri MH17, civila aviadilo en kiu mortis preskaŭ 300 homoj – plejmultaj nederlandanoj kaj aŭstralianoj. Rusio ĉiam klopodis kashi la veron. Finfine alvenis la raporto kiu fingro-montras al rusaj soldatoj kiuj sendis la Buk-rakedon al MH17. Sed Putin ankoraŭ ne pretas montri la kulpulon – t.n. oficiron Orion ?? - au koncedas ke finfine li ordonis, se estis intenca pafo kontraŭ civila aviadilo.

La familianoj havas la rajton scii, kiu kulpis, kaj havas la rajton ricevi ajnan rekompencan.

La tuta mondo havas la rajton scii, kio vere okazis.

En Vikipedio, ekz-e detale en la angla kaj germana, nur koncize en la Esperanto-versio:
www.en.wikipedia.org/wiki/Malaysia_Airlines_Flight_17

Jen Badische Zeitung (2018-05-25):

www.badische-zeitung.de/ausland-1/niederlande-und-australien-machen-russland-fuer-abschuss-von-mh17-verantwortlich--152970532.html

= =

2018-05-25 Datumprotektado – specife en EU

Fejzbuk (facebook) misuzis prekaŭ cent milojn da privataj datumoj por gajni profiton – la alia firmao misuzis tiujn por influi la elekton de tiu „interesa“ usona prezidento.

Ene de EU nun validas novaj reguloj kiuj pli bone protektas privatajn datumojn, kaj lasas uzo-raĵton al la homoj (germane DSGVO, angle GDPR, .esperante: ĝenerala datum-protektita regularo) . Aliflanke tiu regularo ankau devigas asociojn obei tiujn regulojn.

Pro tio AVE metis informon sur sian retejon, kaj nun formetis la nombrilon. Krome AVE informas vin – karaj legantoj - ke ni sole uzas viajn ret-adresojn por sendi mesaĝojn – lau „nigra kopio“ t.s. ke vian ret-adreson neniu alia vidos. Escepte ni uzas la poshtadresojn de tre malmultaj kiuj ne havas ret-aliron.

Se temas pri projekto la respondeculoj povas esti nomataj, parte kun ret-adreso.

2018-05-25 Usona prezidento malrespektas kontraktojn

Kaj pri Irano kaj pri Norda Koreio prezidento Trump agadas ne-konvene; eble li opinias ke li estas Dio, kiu regas chion. Au simple monopolisto kiu perforte eluzas sian povon.

==

2018-05-08 Usona prezidento kontraŭ Irano – li forlasis la atom-kontrakton

Plej multaj registaroj plendas kontraŭ chi-tia agado, char Irano agis lau la kontrakto, kiu estis atingita dum mult-jara diskutado. Tiamaniere li kvazau permesas al Irano daurigi sian atombomban programon.

Komento AVE/mw: Paralele Usono nun translokigas sian ambasadejon al Jerusalemo; kio kontraŭas la Rezolucion 242 de la UN-Sekureckonsilio, decidita 1967 post la milito. Ankau la salami-taktiko flanke de Israelo subteni setladon en la Okcidenta Bordo, kiu apartenas al Palestino, estas ne akceptebla. Same ke la orienta parto de Jerusalemo ne apartenas al Israelo. Krome, Israelo devus kunlabori solvi la problemon de palestinaj rifughintoj; pro tio ili antaŭ nelonge manifestaciis dum pluraj tagoj je la limo inter Gaza kaj Israelo.

Aliflanke ke la arabaj najbaroj respektu la rajton de Israelo resti la limoj de 1949.

(mi petas pardonon se tiu estas tro konciza – detalojn vi trovos che Wikipedia.org).

2018-03-09 Interparoloj kun Norda Koreio

Mirinde ke el la sporta kun-agado inter orda kaj suda Koreioj rezultis ankau politikaj interparoloj inter ambau registaroj; kaj eble ankau kun Usono. Logike, ke la norda registaro volas havi respekton kaj garantion pri sia sekureco. Espereble tio ankau kaŭzos multe pli da respekto rilate Homaj Rajtoj en N.K..

==

2018 Israelo-Palestino – Trapasi la muron, vizio de Marc Bravermann

Eble vi rememoras la belan kaj valoran afiŝon kun titolo „PACO“ en pli ol 100 lingvoj ?

Ghi estas mendebla kaj rigardebla che la UEA-libroservo.

Paco – ne estas nur la kontraŭo de milito – ne nur la periodo inter du militoj.

Paco estas multe pli. Paco estas la legho de la homa vivo.

Paco estas tiam, kiam ni agas juste kaj kiam inter chiuj unuopaj homoj kaj chiuj popoloj regas justeco.

Jes, ekzistas pluraj konfliktoj sur nia planedo kie necesus Justa Agado. (facila vortumo)

Rilate la konflikton inter Israelo kaj Palestino iu proponis la libron de Marc Bravermann „Die Mauer überwinden“, la angla originalo „A wall in Jerusalem“; subtitolo: „Vizio por israelanoj kaj palestinanoj“.

Li estas judo, psikologo kiu vivas en Usono, prelegas nuntempe en pluraj germanaj urboj.

Jen lia prelego en Kiel, Germanio (en la angla kun traduko):
<http://www.youtube.com/watch?v=VELJ5juv6LM>

==

2018 Chu iam al Okcidenta Azio venos paco ?

De Afghanio ghis Turkio kaj Arabio estas sangaj konfliktoj.

Historisto* jam komparis ilin kun la t.n. 30-jara milito (fakte estis ch. 3 militoj enplektitaj);
kaj montris, ke la pacigo dauris 3-4 jarojn.

Tiam batalis divers-opiniantaj kristanoj por gajni terenon por sia kredo.

Simile nun en Okcidenta Azio batalas la du grandaj islamaj kredoj; krome la judoj, kiuj volas havi sekuran landon por si.

Komento: al tiu danghera miksajho aldonighas klimataj problemoj (sekeco), korupcio (kiu bremsas la evoluighon), kreskanta homamaso kiu bezonas laborlokojn, nutrajhon kaj akvon.

Chu iu sukcesos atingi pacigan ekvilibron ?

*) recenzo pri libro: http://www.deutschlandfunkkultur.de/herfried-muenkler-der-dreissigjaehrige-krieg-eine-blaupause.950.de.html?dram:article_id=402892

==

2018-01-01 esti LGBT* apartenas al la Homaj Rajtoj

Se vi mem spertas diskriminacion pro via seksa orientigo vi certe konas „AllOut.org“ kaj

Se por vi alia ol hetero-seksa orientigo estas fremda, bonvolu informighi pri la argumentoj ke estas normale ke ekzistas diversaj seksaj orientigoj. Jen la retejo en pluraj lingvoj:

[Www.allout.org/en/campaign-highlights/](http://www.allout.org/en/campaign-highlights/)

Ankau la Verdaj Partioj subtenas tian Homan Rajton.

Ekzistis faka asocio che UEA, sed iliaj ret-adresoj nun ne funkcias.

2016-12-13 Open Russia Edukado-Centro komencis instrui

sendependajn kandidatojn por urbaj konsilioj kaj aliaj civilaj instancoj en Rusio.

www.khodorkovsky.com/open-russia-supporting-next-generation-independent-leaders/

Kaj jen oferto de Malferma Rusio studi rete politikajn historiajn ekonomiajn sciojn:

(en la rusa) www.openuni.io/

La registaro malpermesis al Navalny kandidatighi por la prezidenteco, sub konstruita preteksto.

Necesus – ne bojkoti la elekton – sed trovi alian taugan kandidaton, ekz-e Xenia Sobchak.

www.khodorkovsky.com/kseniya-sobchak-russians-dont-need-tsar/

Komento AVE/mw: Estas malfacile elstari en Rusio (se oni ne apartenas al la reganta grupo).

Eble niaj rusaj geamikoj konas alian civilan kandidaton ?

(Putin ja venas el la sekreta servo – kaj tiel kondutas.)
